# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

LA HOUSSAYE EN BRIE
77610 FONTENAY TRESIGNY
FRANCE

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★

(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro R. Cl. COLAS 6, rue de Mézières 75006 PARIS
Sekr: F-ino G. PREUX 55/3 Rés. Terrasse Rue du 11 nov. 59290 WASQUEHAL
Kasistino: S-ino J. VINCENT L' Oazo B. P. 54 49150 BAUGE
Religia kons: P. BOURDON 7, avenue Salomon 59000 LILLE
Peranto I.K.U.E.: P-ro R. DEGRELLE B. P. 23 54510 TOMBLAINE

C.C.P. Association Catholique Française pour l' Esperanto 2324 93 N ROUEN

==== la n°: 6 F. Abono: 23 F (TTC). Kotizo: 7 F. Sume: 30 F. ====

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

N.B. La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent nepre antaŭ la 5-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

==== N° 149 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====

*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***

==== JUNIO 1986 ====

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## UNUA EĤO EL NANTES

Denove nia asocio kunvenas por sia ĉiujara statuta kunveno. Mi salutas la partoprenantojn, kaj en la nomo de ĉiuj, mi elkore dankas niajn lokajn samideanojn, kiuj kun nia amiko Lafargue, prizorgis la organizadon de nia gastado en la bela regiono de Nantes.

Dum la jaro 1985, la komitato kunvenis kiel kutime en la sidejo de U.F.E. Mi esprimas nian dankemon al tiu asocio kaj ĉefe al nia kara amiko R. Despiney.

En nia trimonata bulteno aperis ĉiufoje la protokoloj de niaj komitatkunvenoj. Dank' al nia sindonema redaktorino S-ino Vincent, kaj al la kunlaboro de pluraj verkintoj aŭ tradukintoj, ĉiu numero alportas al la legantoj esperantajn legaĵojn, novaĵojn, elementojn aŭ argumentojn por subteni kaj kunligi nian agadon. Al frato Marmou ankaŭ nian dankon por la laboro de presado kaj dissendado.

En la lasta bulteno, vi legis la financan raporton de nia kasistino; vi rimarkis, ke la jaro finiĝis per negativa saldo; sed rimarku, ke la asocio presigis informilojn: uzu ilin! Kaj dankon al S-ino Vincent, kiu akceptas ne nur kotizojn, sed ankaŭ subtenajn donacojn.

Nia kongreso en 1985 okazis en Saint-Etienne, organizita de S-ro Thiollière helpata de "stefanaj" samideanoj. Ni ĝuis la akceptemon de niaj amikoj, kaj la interesplenan rigardon al la industrioj de tiu laborema urbo; la lasta tago kondukis nin al Le Puy, nacia pilgrimejo dediĉita al S-ta Miĥaelo kaj al la giganta statuo de Nia Sinjorino.

En Aŭgsburgo, pluraj el niaj membroj partoprenis en la Ekumena Kongreso. La etoso inter kristanoj estis frata kaj varma, kaj ili komune preĝis kaj celebris en la kapelo de la kongresejo. Dimanĉon, en la katedralo, pastroj el diversaj landoj kunĉelebris la sanktan meson kun la pastroj de la paroĥo, kaj ni, unuigitaj kun la kutimaj paroĥanoj preĝis kaj kantis alterne germane kaj esperante; samtempe okazis la Sankta Manĝo en la protestanta preĝejo S-ta Anna.

.../....

Ni elkore dankas ĉiujn, kiuj sindone laboras por la vivo de nia asocio, kaj por la uzado de Esperanto je la servo de nia kredo; en tiu raporto mankas multe da faktoj, ĉar vi agas tro diskrete kaj ne informas nin pri viaj propraj klopodoj. Tamen ni gratulas speciale Pastron Bourdon pro lia agado ĉe la movado de la Kunuloj de S-ta Francisko. Simile, ni gratulas tiujn, kiuj celas varbi, ĉe la katolikaj movadoj, junajn elementojn, kiuj formos la fundamentajn ŝtonojn por la XXI-a jarcento.

Bonvolu nun, en amika interŝanĝo, proponi viajn solvojn, viajn provadojn, viajn spertadojn por la disvastigo de nia idealo en viaj vivmedioj, en la kristanaj komunumoj.

Dio benu ĉiujn klopodojn por la interkompreniĝo de la homaro kaj por la surtera Paco.

R. Cl. COLAS

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

## RISKI SIAN VIVON

Sinjoro, mi dezirus esti el tiuj, kiuj riskas sian vivon, kiuj donas sian vivon... Kial la vivo, se ne por doni ĝin?

Sinjoro, vi naskiĝis hazarde dum vojaĝo, vi mortis, kiel malbonulo; eltiru min el mia egoismo kaj komforto. Markite de la krucosigno, mi ne timu malmolan vivon. Igu min disponebla por la bela aventuro al kiu vi vokas min. Mi progresigos mian vivon, Jesuo, laŭ via parolo. Mi riskos mian vivon, Jesuo, pro via amo. Eĉ se la aliaj estas saĝaj, vi diris al mi esti malsaĝa. Kelkaj fidas je la socia ordo; vi diris al mi fidi je la amo. Kelkaj opinias, ke oni devas esti konservema; vi diris al mi ekpaŝi kaj esti preta por ĝojo kaj sufero, por malsukceso kaj sukceso, ne fidi min mem sed vin, riski la kristanan vetludon sen zorgi pri la rezulto...

Kaj fine riski mian vivon, fidante vian amon.

JOLY (La bela risko de la kredo)
Traduko A.B.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

## SENDITAJ DE LA SPIRITO

Por ni kristanoj, la religia horizonto estas okupita ĉefe de la du unuaj personoj de la Sankta Triunuo: la Patro al kiu ni adresas fervorajn "Patro nia"jn; la Verbo, kies enkarniĝo kaj surteraj vivo, sufero, morto kaj releviĝo kaŭzis nian savon. Por multaj, la tria kristana persono, kiu gravas en ilia vivo estas ĉu la Virgulino, patrino de Kristo, ĉu la papo, respondeculo de la Eklezio de Kristo. La tria persono de la Triunuo ŝajnas ne multe gravi!...Tamen, ni iomete pripensu.

### LA SPIRITO PROFUNDE AGAS EN NI

La vivo en nia nuna mondo estas pli kaj pli malsimpla. Eltrovoj aperas ĉiutage kaj multaj el ili rapide ŝanĝas la praktikajn kondiĉojn de nia aktivado. Kion ni hieraŭ decidis, tio kelkfoje devas esti tute ŝanĝita. Nia organizo malfacile starigita la antaŭan tagon, montriĝas tute preterpasita de la realeco de la tago mem. Nia kristana vivo bezonas ne nur forton kaj kuraĝon, sed ankaŭ kaj ĉefe lumon kaj orientadon. La ĉefa rolo kaj agado de la Sankta Spirito estas doni al ni tiun necesan orientadon. Li estas ne nur Spirito de forto, sed ankaŭ de inteligento kaj saĝo. Li povas sugesti al ni la plej valorajn agadojn. Dum ni havas tre limigitan vidon pri la historio kaj geografio, la dia Spirito vidas la tutan vivon de la homoj ekde la komenco ĝis la fino kaj Li ĝuas la eternan konon, t.e. lasammomenta vidado de ĉiu homo kaj de ĉiuj homoj kaj de ĉiuj lokoj, nacioj, estaĵoj surteraj kaj eksterteraj. Tiu ĝenerala scio ebligas al la Spirito perfekte gvidi nin al nia plej perfekta tera kaj ĉiela feliĉo.

### HOMARA LINGVO, HOMARA APOSTOLADO

El la unua parto de ĉi tiu artikolo, ni komprenis, ke kristanoj renkontas, en la persono de la Spirito, la plej valoran helpanton por realigi siajn esperantistajn eblecojn. La Spirito sciigas nin, pli kaj pli klare kondiĉe, ke ni aŭskultu Lin, kiel granda graco estas la kapablo paroli la "katolikan lingvon". Ĉiutage Li helpas nin "katolike" paroli, t.e. kun kristana Amo al ĉiuj niaj mondaj fratoj. Ni ne diras "ni amas ANKAU la alilandanojn". Ni amas senpere, senlime la homojn de la tuta tero, ĉar ili estas kiel ni kreitaj de la UNIKA DIO kaj estas ETERNE NIAJ FRATOJ VENINTAJ DE LA SAMA KAJ UNIKA PATRO.

.../....

Sur la lipoj de kredantoj, Esperanto ne estas nure turisma lingvo, sed la lingvo de la universala frateco. Per ĝi, la Spirito de Amo instigas nin helpi iun ajn homon, devenintan de iu ajn lando, kiel aŭtentan Fraton. Per ĝi, la Spirito sugestas al ni, en la profundo de nia animo, atente aŭskulti niajn providencajn proksimulojn de la tero. Per ĝi, la Spirito de Pentekosto kaj de Konfirmacio igas nin konstruantoj de mondskale frata Paco. Ĉu tio estas revo? Jes, sed la revo de Dio! Kiu rifuzus aŭskulti Dion?

Ho Spirito de senlima Amo, helpu nin atente aŭskulti viajn inspirojn. Vin sekvante, ni disvastigos sur la tutan teron, dissiritan per malamo, milito kaj rasismo, Amon, Pacon kaj Interkomprenon.

Louis BOURDON,dominikano

+++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

PRI KELKAJ SANKTULOJ

S-ro BRANS, Nederlandano, fidela ano de FKEA, kompilis libron pri kelkaj sanktuloj. Laŭ la bultenaj eblecoj, ni iom post iom aperigos tiujn biografiojn.

SANKTA JOHANO BOSCO, sacerdoto

J. Bosco (Don Bosco) naskiĝis la 16/8/1815 en la vilaĝo Becchi apud Torino el malriĉaj gepatroj. Kiam li estis dujara, lia patro mortis. Kiel dekjara knabo, li havis sonĝon: Kristo portis lin meze de grupo de sovaĝiĝintaj knaboj, kiuj blasfemis kaj furiozis. Li volis ekbati, sed Kristo diris:"Ne per batado, sed per mildeco kaj amo vi igos ilin amikoj". La knaboj iĝis hundoj, lupoj, leonoj kaj ursoj. Kristo ree parolis:"Tio ĉi estas via laborkampo. Iĝu humila, fortika kaj energia, kaj la ŝanĝon, kiun vi nun vidos en ĉi tiuj bestoj, vi poste efektivigos en miaj infanoj". Johano vidis kiel la sovaĝaj bestoj iĝas mildaj ŝafidoj ĉirkaŭ Kristo. Tio estis la vizio de la vokiĝo de J. Bosco al pastreco kaj patreco de forlasitaj proletaj knaboj. Sed kiel iĝi pastro, ĉar li nenion posedas? Per ĉiuj eblaj manieroj li havigis al si la rimedojn: li kaptis birdojn, faris kaĝojn kaj ĉapelojn, kolektis fungojn, ŝpinis lanon kaj linon, bredis silkraŭpojn trikis ŝtrumpojn, laboris kiel servisto kaj paŝtisto, instruis mense postrestintajn infanojn. Dume li preĝadis kaj studadis, unue ĉe kelkaj pastroj, poste en la lernejo en Castelnuovo. Li loĝis ĉe malriĉa tajloro, kiu instruis lin tondi, kudri kaj muziki; ĉe la najbaroj li lernis ŝufaradon kaj hejman industrion; en Chièri, kie li poste vizitis la lernejon, li lernis kuiri, friti kaj ĵongli, per kio li poste ĝojigis siajn protektatojn. En 1841 li iĝis sacerdoto. Li kunvenigis sur stratoj kaj placoj nenies infanojn, ludis kaj preĝis kun ili, kaj tiuj degeneriĝintaj knaboj multe amis lin. Li fondis Oratorion, malfermita junulardomo. En 1854 li arigis kunlaborantojn. En 1859, li fondis la kongregacion de la Salesianoj de Don Bosco. Li donis al siaj helpantoj la ekzemplon de S-ta Francisko de Sales, arda konanto de la spirita vivo. La 31/1/1888 mortis Don Bosco en Valsalice. En 1929, oni transportis lian korpon al la preĝejo de Maria, Helpo de l' kristanoj en Torino. Liaj spiritaj gefiloj, Salesianoj kaj Filinoj de Maria, Helpo de l' Kristanoj, daŭrigas la laboron por savi la junularon por Kristo.

SANKTA ANSGARO, episkopo

Li naskiĝis en Okcidenta Flandrujo en 801. Kiel 5-jara infano, li perdis la patrinon. Lia patro kondukis lin al la klostra lernejo de la abatejo de Corbie. Li pli ŝatis ludi ol labori kaj preĝi. La morto de Karolo la Granda, kiun li estis vidinta, forte kortuŝis lin en 814. Tiam li dediĉis sin al la servado de Dio. Li sacerdotiĝis. Ludoviko la Pia, filo de Karolo la Granda, kunirigis lin kun Harald II-a, reĝo de la Danoj, kiu post sia ekzilo reiris al sia lando. Harald ĵus kristaniĝis. Ansgaro bone sukcesis en sia misia laboro. Delegitaro el Svedujo petis predikistojn. La imperiestro venigis Ansgaron, kiu tiam vojaĝis norden kun du kunuloj. La reĝo de la Svedoj Björn tre afable akceptis la misiistojn en 829. Kiam Ludoviko aŭdis pri la sukceso, li decidis nomumi por la nordo ĉefepiskopon kun sidejo en Hamburgo. Li elektis Ansgaron. De la imperiestro li ricevis la klostron Turholt en Flandrujo, kie li edukis junajn skandinavianojn por la misio en la nordo. Papo Gregoro IV-a nomumis lin kiel sian delegiton por la popoloj de la nordo. En Hamburgo li konstruigis preĝejon kaj klostron por estontaj misiistoj. La Normanoj prirabis kaj detruis multon. La misio estis en malfacila situacio. Ansgaro ne plendis, sed preĝis. En 848 li ree akiris influon en Danlando kaj en 852 li ricevis permeson de reĝo Olaf por anonci la Evangelion en lia lando. Li mortis en Bremeno la 3/2/865. Lia posteulo S-ta Rembert lasis biografion de Ansgaro: aminda sanktulo, interne monaĥo, ekstere apostolo.

RAPORTO PRI LA KOMITATKUNVENO DE LA 23-a DE FEBRUARO 1986

Ĉeestis: S-inoj Michau, Vincent, F-ino Preux, P-ro Bourdon, F-to Marmou, S-roj Bessière, Colas, Despiney, Lafargue, Pons, Villeneuve.
Tagordo kaj raporto pri la antaŭa kunsido aprobitaj.
S-ro Lafargue, kun helpo de la loka grupo, aktive preparas la FKEA-kongreson en Nantes. Dum la nacia kongreso en Gérardmer, P-ro Degrelle diservos.
Nia membraro ne multiĝas: ĉ. 170.
Mankas artikoloj por la bulteno.
IKUE: P-ro Bourdon, nia reprezentanto, ne ricevas informojn; estus bone, ke ni komuniku al li la decidojn de nia kongreso. EK ne ĉiam estas regule sendita.
Radio "Scouts de France" elsendis pri Esp° la 22-an de februaro. La filmo "L'effrontée" entenas frazon en Esp° kun klarigo pri la lingvo.
Necesus sendi fotojn al "Heroldo" kaj raporton al la ĵurnaloj, skribi al "Jour du Seigneur".
La venonta komitatkunveno okazos en Nantes.

Protokolis: S-ino J. Michau

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

RAPORTO PRI LA KONGRESO EN NANTES

P-ro Bourdon prezentis la temon:"Je la aŭskultado de Kristo". La ĉeestantoj, dividitaj en du rondoj, kune meditis kaj interŝanĝis siajn alproksimiĝojn al la respondo. Ree kuniĝinte, ili provis prezenti sintezon kaj konkludon. Jen resumo de tiuj dutagaj laborkunsidoj:

KIE ONI TROVAS KRISTON?

Unue en la Evangelio, en Dio enkarniĝinta, oni trovas la Vorton de Dio homiĝinta. Estas la Vojo, Vero kaj Vivo, aŭ laŭ pli taŭga traduko, la Vojo Viva kaj Vera. Kiu vidas Jesuon, laŭ propraj paroloj, vidas ankaŭ la Patron. Kaj oni povas ricevi la revelacion per la ago de la Sankta Spirito, la Dono de Kristo al la Eklezio, kiam, antaŭ la ĉieliro, Li sendis siajn disĉiplojn porti Lian parolon al la tuta tero.

Due en la Biblio; tiu libro atestas la ligon per sia promeso de Dio al la homaro, en la persono de Abrahamo kaj de lia idaro realiĝinta en la vivo la pasionon kaj releviĝon de Kristo.

Trie en la tuta homaro; kreitoj de Dio, dediĉitaj al la savo kaj al la eterneco, ĉiuj estas kunligitaj, egalaj en la amo de Dio; riĉaj aŭ malriĉaj, kredantoj aŭ ne, feliĉaj aŭ kompatindaj, ili estas parto de la grego, objekto de la komplezemo de la Kreinto.

Sed ĉefe en ni mem, ni devas realigi la vorton de S-ta Paŭlo: Jesuo vivanta en ni. Per la sankta Eŭkaristio kaj per la sakramentoj ni konservas la vivon spiritan.

En la katekizado, ni devas trovi kaj instrui, ne nur regulojn, sed vivantan parolon. Kaj kun la helpo de la S-ta Spirito, ni trovas la forton konformi niajn agojn al la amo de Dio kaj de niaj fratoj, ankaŭ filoj de Dio.

Antaŭ ol ĉieliri, Kristo laste diris:"Vi ricevos povon, kiam la Spirito venos sur vin, kaj vi estos miaj atestantoj ĝis la plej malproksimaj partoj de la tero". La dono de la graco de Pentekosto faris el ni ankaŭ la heroldojn de la Vorto de Dio-Jesuo.

Resumis: R.Cl. Colas

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

RAPORTO PRI LA ĜENERALA KUNVENO

Dimanĉon je la 9.30 malfermiĝas la kunveno en la centro Naudières en Rezé. Post bonvenigo fare de S-ro Lafargue, ĉefa organizanto, kaj legado de senkulpigaj leteroj (S-roj Bessière, Degrelle, Giovénal, Pierru, Villeneuve), S-ro Colas prezentas la agadraporton (v. p. 1) kaj S-ino Vincent la financan raporton. Ambaŭ raportoj estas unuanime akceptitaj. S-roj Degrelle, Marmou, Pons kaj Villeneuve estas reelektitaj komitatanoj.
La kunveno proponas pli intensan informadon, ne nur eksteran, sed ankaŭ internan: multaj katolikaj esperantistoj tute ne konas FKEA. Uzu la novan informilon!
Oni invitas al sendo de materialo por distra paĝo en la bulteno. Aperos ankaŭ "persona rubriko" kun informoj pri la anoj (profesio, familiaj eventoj k.s.)
Kongreso 1987: en Orsay de la 8-a ĝis la 10-a de majo.
Kongreso 1988: en LOURDES. Jam de nun anoncu tiun eventon al viaj alilandaj korespondantoj.
Espero Katolika: la aspekto pliboniĝis, kaj la enhavo iĝis pli interesa.
Por esti pli fortaj, necesas unuiĝi kaj kunlabori kun la landa asocio U.F.E.

.../....

S-ro Brans, nederlanda ano, kompilis libron pri sanktuloj kaj serĉas eldoniston; FKEA ne povas tion prizorgi sed aperigos kelkajn el tiuj biografioj (v.p. 3)
P-ro Degrelle pretas traduki pliajn kantikojn; sendu viajn proponojn.
La 10-a pilgrimo en Banneux (kun Esperanto partopreno) okazos de la 13-a ĝis la 14-a de septembro 1986. La kunuletoj de S-ta Francisko pilgrimos en julio.

RAPORTO PRI LA KOMITATKUNVENO

La estraro restas senŝanĝa.
La venonta kunveno okazos en Paris la 21-an de septembro 1986.
Protokolis: S-ino J. Michau

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

NOTU SUR VIA KALENDARO

1. 26/7-2/8/1986: okaze de la 75-a datreveno de la fondiĝo de KELI, la franca sekcio organizas la 37-an KELI-kongreson en ROUILLE (Vienne). Inf: P. Cousson 64, Hameau des Plaids NOUAILLE-MAUPERTUIS 86340 La VILLEDIEU du Clain.
FKEA gratulas kaj deziras plenan sukceson al tiu kristana renkonto.
2. 13-a ĝis 23-a de aŭgusto: vojo de la kunuletoj de S-ta Francisko en Tarentaise Aĝo: 10 ĝis 15-jara. Inf: T. Depecker Echines Dessus 73700 BOURG St-MAURICE.
3. 16-a ĝis 29-a de aŭgusto: 5-a internacia feriado "Esp° hejme"
1-a ĝis 14-a de septembro: 22-a internacia Esp° feriado "Ora pola aŭtuno", ambaŭ en Miedzygorze (Pollando). Inf: Pola Esp° Asocio WROCLAW 17 ul. Dubois 3
4. 13-14/9/1986: esperantistoj preĝos "Nian Sinjorinon de ĉiuj nacioj" en Banneux (Belgujo) por la katolika movado kaj la paco en la mondo.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

NIA MEMBRARO

Nova membro: S-to CAZIN (P-de-C). Koran bonvenon!

Renovigis sian dumvivan kotizon: F-ino CHATELUS (Rhône) kaj S-to SCHNEIDER (Yonne)
La bona ekzemplo de S-ro Fardet donis fruktojn. Kiu sekvos?
Elkoran dankon al tiuj malavaraj helpantoj.

Bedaŭrinde, ankoraŭ <u>trideko</u> da anoj "forgesis" pagi sian kotizon por 1986. Ili bonvolu tion fari TUJ; ili ne ricevos plian alvokon, ĉar tio tro multe kostas al la asocio. Ĉi tiu bulteno estas la lasta sendita al ili. ATENTU!

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

LA IKUE-MEMBRARO

Aliĝis por 1986: 3) S-ino Petit Bricout;4) P-ro G. Schneider; 5) S-ro F. Corthinas 6) S-ro P. Fereira; 7) S-ro S. Aunoste; 8) S-ro J. Jouan; 9) S-ro J. Seguin; 10) S-ro J. Amouroux; 11) S-ro J. Leyder; 12) F-ino P. Chatelus; 13) S-ro L. Vernin; 14) S-ro P. Vernin; 15) S-ro R. Cl. Colas; 16) S-ro R. Baradel; 17) S-ino B. Cheverry; 18) S-ro P. Cugny; 19) S-ro P. Royer; 20) S-ro E. Thiollière; 21) S-ro R. Bernard; 22) S-ro R. Fardet; 23) S-ro C. Sanson; 24) S-ro A. Bessière; 25) S-ro R. Lecocq; 26) S-ro J. Doyelle; 27) F-ino A. Stutzmann; 28) S-ro A. Gourdon; 29) S-ro B. Sautreuil; 30) P-ro L. Goudé; 31) S-ro R. Hardy; 32) S-ro R. Jossinet; 33) F-ino G. Preux; 34) S-ino M. Coulot; 35) F-ino M. Goudé; 36) S-ino A.M. Duzan 37) S-ro R. Pons; 38) S-ro G. Villeneuve; 39) S-ro F. Leeb.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

ZAKARIO, LA ETA BETEO

Zakario, tiam dekdujara, estis lernanto en la lernejo S-ta Jozefo en Grand-Bassam. Oni nomis lin la eta beteo, pro lia etnio. Li retrovis siajn amikojn sur la sportejo, ĉar la piedpilko estis lia preferata sporto. Kun siaj patrino kaj fratineto, Zakario loĝis en lignodomo.

La patrino Jozefina sukcesis pli malpli nutri kaj eduki siajn infanojn dank' al eta vendejo de kuracaj plantoj; ŝi ankaŭ zorgis pri la religia edukado de siaj etuloj.

"Panjo, kion oni devas fari por eniri la ĉielon, demandis Zakario iun matenon.

- Mia filo, tio estas malfacila... Estu akurata ĉe la katekismo kaj vi konos la vojon tien kondikantan..."

Dum la Kristnaska libertempo 1984, fiknabo vokas Zakarion:"Venu helpi min; vi gvatos, dum mi ŝtelos.- Sed mi ne povas, Jesuo ne estus kontenta".

.../....

Ekfuriozinte, la knabaĉo enkojnigas Zakarion kontraŭ muron kaj per ŝtono preskaŭ batmortigas lin. Zakario pene paŝas ĝis la hejmo kaj avertas sian patrinon, ke la kapo, la okuloj kaj la dentoj treege doloras. Sed la kuracplantoj ne sukcesas mildigi la doloron, kiu kreskas. Estas necese iri al la malsanulejo, kie la kuracisto konstatas, ke la kapo estas ege ŝvelinta. Estas tro malfrue. Kaj, la 6-an de januaro 1985, post tutplena rakonto al la patrino, Zakario mortas.

En la preĝejo, la lernantoj, la samfamilianoj kaj la amikoj amasiĝas apud la eta beteo. La paroĥestro, pastro Adolfo, rakontas la historion de Zakario, kiu iĝis ekzemplo por la lernantoj de Grand-Bassam.

En la tombejo, Jozefina per siaj fidaj vortoj emociigas la ĉeestantaron: "Zakario, mia infano, vi volis sekvi Jesuon. Nun vi vidas lin vidalvide. Kaj vi, ĉeestantaj infanoj, neniam malbonfaru, eĉ se viaj gepatroj petus tion".

Kia profunda kaj vivanta katekizo en la komenco de la Junulara Jaro.

Laŭ "L' appel de l' Afrique"
bulteno de la afrikaj misiistoj

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

## NORVEGUJO: LANDO KAJ POPOLO

Ni komencas artikolon pri Norvegujo; ĝi estas resumo de broŝuro eldonita en Esperanto de la Reĝa Norvega Ministerio pri Eksteraj Aferoj.

Norvegujo situas sur la okcidenta flanko de Skandinavio; ĝia kultura kaj socia strukturo estas influita de okcidento.

La Norvegoj devis venki malfacilajn klimatajn kaj topografiajn kondiĉojn aŭ adaptiĝi al ili. La ĉefurbo Oslo ja situas sur la sama latitudo, kiel Groenlando kaj Alasko.

La loĝantaro ĵus atingis 4 milionojn, do maldensa priloĝado. Ties kaŭzo kuŝas en la multeco da montoj, glaciejoj, lagoj kaj sovaĝejoj. Tio donas limigitajn eblecojn por la ekonomia aktiveco. Kvankam la lando estas tre montara, la plej alta pinto Galhøpiggen ne superas 2469 m super la marnivelo. En multaj lokoj kuŝas longaj profundaj valoj, ĉiuj kun rivero en la fundo. Tio ebligas loĝadon, terkulturadon kaj aliajn entreprenojn. Profundaj fjordoj inter altaj montoj kreas grandiozan pejzaĝon internacie faman. Kiu jam vidis fruktarbojn dum florado kun fono de neĝkovritaj montoj kaj profunde bluaj fjordoj, tiu ne facile forgesas la vidon. Sognefjordo eniras pli ol 200 km en la landon.

La riveroj formas potencajn akvofalojn kaj produktas elektron por la moderna industrio kaj la hejma mastrumado. Tamen, kiel eble plej multe, oni protektas la naturmedion pere de 14 naturparkoj. Same sur insulo Svalbardo, la blanka urso estas tute protektata.

La norvega marbordo estas pli ol 2600 km longa sen la fjordoj. Kun ili ĝi superas 21000 km. La Golfa Fluo, varmigita en la Karaiba Maro, atingas la norvegan bordon. Pro tio la lando havas senglaciajn havenojn eĉ meze de la vintro. En la somero la marbordo estas paradizo por banado kaj boatado.

Ekde la plej fruaj epokoj, la Norvegoj praktikis fiŝadon eĉ en kruda vintra tago kaj lernis ŝipiri tra ŝtormvipataj markoloj.

Norde la lando invitas al fascinaj idilioj, kiam la noktomeza suno brilas ĵetante sian sorĉan lumon. Tiam, estas plena taglumo dum la tuta nokto. En Tromsø, la plej grava norda urbo, la noktomeza suno brilas de la 20-a de majo ĝis la 22-a de julio.

(daŭrigota)

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

## POEZIA ANGULO

Jen du poemoj de Ronsard (1524-1585) tradukitaj de Guido HOLZ

<u>Al Maria</u>

Magio estas l' am'; se mi dum jaro restas
ĉe mia amatin' por klaĉo kaj deklam'
kaj por rakonti pri pasia mia am',
kiel mallonga tag' por mi la jaro estas.

Sed se triopas ni, min ĝeno tro molestas,
mi eksilentas tuj, la dirojn kaptas lam';
en plena babilad' la vortoj stumblas jam,
kaj mi kaj mia buŝ' skuiĝon manifestas.

Sed kiam solas mi ĉe mia amatin',
la buŝ' pro klaĉa ard' ne venas al la fin',

.../....

parolas ĝis la fund' pri mia amdeziro:
elpensas revojn mi, rakontojn, vortojn nur;
por resti ĉe l' karin' cent jarojn laŭ sopiro,
sufiĉas ne jarcent', ne eblas do forkur'.

Al Kasandra

Karin', ni vidu, ĉu la rozo,
montrinte en belega pozo
purpuran robon je l' maten',
ne perdis tiun ĉi vesperon
de l' purpurplisoj la fieron,
vizaĝan brilon de seren'.

Ve, disperdiĝis, ho karino,
surloke ĝia belfascino,
ve! ve! post eta jam temper'!
Naturo, vere vi avaras,
ĉar tiel brila flor' nur staras
de la maten' ĝis la vesper'.

Karino, se al mi vi fidas,
dum la junaĝo gaje ridas
en la plej verda freŝodec',
la vivon ĝuu do ĝisreste:
ĉar kiel tiun floron peste
vin senbriligos maljunec'.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Antonina APOLLO

NOKTE

La nokto profunda, nigre malhela,
nokto por mi denove maldorma.
Mi pensas malklare pri io bela,
pri io nedifinebla, senforma.

Jam sonĝojn vidas la tuta ĉirkaŭo,
nur en fumtubo bruas la vento,
ĉu tio ĉi estas la adiaŭo,
aŭ ĉu suferas ĝi pro iu sento?

Sed kial ĝi ploras, kial ĝi plendas,
kial senĉese senlace blovas?
Ĉu ĝi al iu la salutojn sendas?
Kial nenie ripozon ĝi trovas?

Vento libera, potenca ĝi estas,
por ĝia povo ne ekzistas la limo -
de uragano nenio postrestas
krom la detruo, ĥaoso kaj timo,

sed ĝi povas esti tre delikata.
Mi petas ĝin: Helpu min iomete -
tuj flugu al urbo fame konata
kaj portu mian sciigon sekrete,

kaj kiam vi tra fenestro eniras,
flustru al mia amiko senpere,
ke mi lin vidi delonge deziras,
anstataŭ mi lin karesu tenere.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

FAMILIAJ NOVAĴOJ

En tiu nova rubriko, ni deziras aperigi ne nur nekrologojn, kiel ni faris ĝis nun pro manko de aliaj informoj, sed ankaŭ la ĝojajn eventojn de niaj familioj: naskiĝoj, geedziĝoj, promocioj k. a.

Bonvolu forlasi vian kutiman diskretecon kaj malavare distrumpeti viajn familiajn okazaĵojn. Ĉion akceptos la redaktorino: S-ino J. Vincent BP 54 49150 BAUGE.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

KORESPONDPETO

Katarina MROZ, 23-jara studentino pri oligofreni-pedagogio 80-266 GDANSK, ul. Grunwaldzka 176/6, Pollando, deziras korespondi kun samfakaj studentoj kaj kun personoj laborantaj en specialaj lernejoj.

* * * *

# NI RIDU

SUNFRAPO.

Ĉar li ne povos ferii venontsomere, Parizano deprimiĝis. La kuracisto konsilis al li memsugestadon per tuttaga ripetado:"La varma suda suno varmigas kaj resanigas min."

Iom poste, lia edzino urĝe vokis la kuraciston. "Ĉu li pli malbone fartas?" miris ĉi tiu.

"Jes, doktoro, li ricevis sunfrapon".

BLANKA REVENO.

Tiu entreprenestro ne bonŝancis ĉe la vintraj sportoj. Necesis rehejmigi lin en ambulanco kaj li devas kuŝi dum minimume tri semajnoj. Lia vicestro venis kuraĝigi lin:"Ĉe la oficejo kaj ĉe la laborejo, ni ĉiuj estis tre kortuŝitaj de via akcidento. Preskaŭ neniu venis labori".

BLUFANTO.

La homoj, klarigas bankestro, daŭre ŝuldas pro simpla kialo: ĉar ili elspezas tiom da mono, kiom ili pretendas enspezi, kiam ili fanfaronas antaŭ siaj amikoj.

SIMILECO.

En islama lando, vualita virino prezentas al amikino sian filineton, ankaŭ vualitan:

"Estas eksterordinare! ekkrias la admiranta amikino. Escepte de la okuloj, ŝi perfekte similas vin".

LA ĈIRKAUAĴO.

"Mia edzo havas strangan manion. Ĉiufoje, kiam mi iras al la piano por kanti, kia ajn estas la temperaturo, li iras sur la balkonon".

Nediskreta demando al la edzo klarigas la aferon al la edzino.

"Komprenu, mi ne ŝatas la klaĉadon. Tial, mi absolute volas, ke la najbaroj vidu min. Se ne, ili povus opinii, ke mi estas batanta ŝin".

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

ENHAVO

1.2. Unua eĥo el Nantes
2. Riski sian vivon
   Senditaj de la Spirito
3. Pri kelkaj sanktuloj
4. Raportoj
5. Diversaj informoj
   Zakario, la eta beteo
6.7. Norvegujo: lando kaj popolo
   Poezia angulo
8. Ni ridu
   Kotiztabelo

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## KOTIZTABELO 1986

| | |
|---|---|
| IKUE kun "Espero Katolika" | 80 F |
| Peranto: P. Degrelle c.c.p. NANCY 2 555 38 L. | |

----------

| | |
|---|---|
| ACFE kun "Franca Katolika Esperantisto" (individuo) | 30 F |
| Geedza paro | 40 F |
| Infano ĝis 16-jara, pastro, religiul(in)o | 15 F |
| Bonfaranto | 150 F |
| Dumviva membro | 600 F |

----------

| | |
|---|---|
| UFE kun "Revue Française" | 185 F |
| UEA kun "Esperanto" kaj Jarlibro | 190 F |

Association Catholique Française pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2 324 93 N/

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Dépôt légal: 2ème trimestre 1986
C.P.P.A.P. n° 62 532.
Directeur: René-Claude Colas
Directeur-délégué:
René-Jean Marmou

!! Polycopié par l' A. C. F. E.
!! Prieuré St-Martin
!! La Houssaye-en-Brie
!! 77610 FONTENAY TRESIGNY
!! FRANCE

* * * * *